# SUDFRANCIA STELO

Bulteno de la Esperanto-Federacio "LANGUEDOC-ROUSSILLON"
Jarabono: 25 F al Fédération d'Espéranto du Languedoc-Roussillon
CCP 956-28 P Montpellier  Nro 118  3-a kvaronjaro 1991




**ÇA S'EST PASSE CET ETE...**

2300 Espérantistes se sont retrouvés au Congrès de Bergen, en Norvège. En 92, le Congrès de Vienne (Autriche) connaîtra sûrement un beau succès. Pour la 1° fois, le Pape s'est exprimé en Espéranto, devant 1.000.000 de jeunes ...

**La PAPO PAROLIS en ESPERANTO:** dum sia publika parolado en Czestochowa (Pollando) antaŭ unu miliono da gejunuloj el la tuta mondo, la 15/8, la Papo Johano Paŭlo II eldiris mesaĝon en pluraj lingvoj, inkluzive de Esperanto. Estas la unua fojo, ke la supera gvidanto de la Katolika eklezio parolas en Esperanto.

**76e RENCONTRE MONDIALE ESPERANTO à BERGEN (NORVEGE):** 2300 délégués de 55 pays.
Okaze de la 76a Universala Kongreso de Esperanto en Bergeno, la urbo, en kiu tradicie pluvas, bonvenigis la multajn kongresanojn per brila suno kaj varma temperaturo. Oni venis al Bergeno aere, tere kaj mare (ŝipe ne ĉiam sen aventuroj!) Dimanĉe, antaŭ la Inaŭguro, oni eksciis, ke 40km for de la Bergena haveno, krozas en la maro Litova ŝipo (ĉu ĝi estis.. spiona?) kun Sovetaj esperantistoj kiun la norvegaj sekurecinstancoj ne lasas albordiĝi. La kaŭzo estis, ke la turisma ŝipo estis ankoraŭ notita en la registroj de Lloyds, kiel scienca ŝipo kun alte potencaj esploreblecoj.. Finfine, marde, ĉio bona, kio bone finiĝas! La Ministerio de Eksterlandaj Aferoj kaj la Turisma Instanco prenis sur sin la loĝistikajn kostojn de ĉiuj 72 personoj (ili ja ne povis loĝi kaj manĝi sur la ŝipo, kiel estis planite).
Pri la Universala Kongreso, oni kalkulis pri 1500 kongresanoj, aliĝis 2300!
Pri la ekskursoj, granda parto de la kongresanoj elektis merkrede unu el la multaj proponoj kaj veturis al la du plej longaj norvegaj fiordoj, dum aliaj rigardis "Norvegion en nuksoŝelo" aŭ aliajn naturbelaĵojn de tiu vastega lando, plena de montoj, arbaroj, fiordoj, riveroj, akvofaloj kaj sovaĝa marbordo.




TARRAGONA

Vous lirez dans ce numéro les compte-rendus de rencontres récentes et noterez les dates des prochains rendez-vous, spécialement du Congrès fédéral 92, les 16 et 17 Mai à MONTPELLIER.

Nos amis catalans vous attendent prochainement à Tarragone, nos voisins italiens à Vérone pour le Congrès européen mais vous préfèrerez peut-être aller au Festival de Paris. Voyez en page 2 : une nouvelle formule, déjà appliquée pour le Congrès de Bergen, vous permettra de participer beaucoup plus facilement.

**Ne plu hezitu partopreni!**




CASA DI GIULIETTA

**Sur votre agenda**


| | | |
|---|---|---|
| LYON (69) | - Congrès national des Espérantistes catholiques | 30/4-3/5/92 |
| MUNSTER (D) | - Congrès internat. des Espérantistes cheminots | 16-22/5/92 |
| VERONE (I) | - Congrès Européen d'Espéranto & E°-France | 5-10/6/92 |
| VIENO (A) | - 77e Congrès Universel d'Espéranto (UEA) | 25/7-1/8/92 |
| MONTREAL (CDN) | - 48e Congrès international des Jeunes (TEJO) | 2-9/8/92 |
| QINGDAO (CHINE) | - 5a Pacifika Kongreso de Esperanto | 17-22/8/92 |

**25a KATALUNA KONGRESO DE ESPERANTO**
**1-3 NOVEMBRO 1991**

**7a INTERNACIA KULTURA ESPERANTO FESTIVALO**

9 - 10 NOVEMBRO 1991

M.J.C. 31 BOULEVARD GAMBETTA, ISSY LES MOULINEAUX (92)




Nimbuso laù la difino de PIV estas pluvoporta griza nubo. En nia federacio,ĝi estas iniciato de la Unesko-E° klubo de Nîmes kaj de "Rencontres internationales" por disponigi al la esperantistoj,kiuj intencas partopreni E°-aranĝojn, 9sidlokan buseton. La luprezo ebligas malmultekostan vojaĝon,se la buseto estas plena. Se pli ol 9 personoj aliĝas al iu vojaĝo,eblas lui duan buseton.
Jam funkciis la sistemo por la kongreso de Bergen;estas antaùviditaj vojaĝoj per "Nimbuso" al la Festivalo de Parizo, al la Eùropa kongreso de Verona,al la UK de Vieno,ktp.
Se iu el la aranĝoj interesas vin, rapide kontaktu Andrée Gaussen.

*****

## INTERNACIA KULTURA ESPERANTO-FESTIVALO EN PARIZO (9-10 XI)

Programo:

| | | |
|---|---|---|
| SABATON, la 9an de novembro: | 15.00: | Recitalo de Jak Le Puil (Francio) Malnovaj tradiciaj instrumentoj (Germanio) |
| | 17.00: | Teatro: Kia Koincido (Germanio) prezentas: "La pupohejmo", de Ibsen |
| | 21.00: | Internaciaj varietoj kun Jomart & Nataŝa (Kazakstano), Eruda (Ĉinio)... |
| DIMANĈON, la 10an de novembro: | 10.00: | Literatura forumo: "Kien la poezio?" kun J.P.Danvy, Moissej Bronŝtejn (S.E.U.)... |
| | 14.30: | Teatraĵo: "Venontjare denove kune" kun Angelina Sotirova & Miĥail Serdotov (Bulgario) |
| | 16.30: | Koncerto de rokmuziko: Rozmariaj Beboj (Francio) |
| | 19.30: | Komuna vespermanĝo |
| LUNDON, la 11an de novembro: | 10.00: | Gvidita vizito tra Parizo |

Tarifoj:

| | |
|---|---|
| Enirkarto valida por la 5 spektakloj +literatura forumo | 250F |
| " kun rabato (membroj de UFE/TEJO) ............ | 200F |
| " por 3 spektakloj .............................. | 150F |
| " por 1 spektaklo................................ | 60F |
| Literatura forumo ............................... | 20F |
| Komuna dimanĉa vespermanĝo....................... | 100F |
| Lunda vizito..................................... | 40F |
| Hotelĉambro (por 1 aù 2 personoj),ĉiu nokto........... | 170F |

Vi povas ricevi specialan trajnan rabatkuponon (20%)
Aliĝoj antaù la 25a de Oktobro al Daniel DOYE 169,Avenue de Choisy 75013 Paris
(kunsendi afrankitan leteron je via adreso) Tel.:(1)45 83 36 25

*****

ASSOCIACIÓ CATALANA D'ESPERANTO — KATALUNA ESPERANTO-ASOCIO

invitas vin al la 25a Kataluna Kongreso de Esperanto

Petu aliĝilon de SFS!

telefakso- 727.4208
Apartat, 290 - Poŝtkesto, 290
T.(9)3-716 36 33 - 08280 SABADELL
CATALUNYA - KATALUNIO

en TARRAGONA
de la la ĝis la 3a de Novembro

### TARRAGONA

La ĉi-jara kongresurbo kun proksimune 110.000 enloĝantoj estas tre grava kataluna haveno kies originoj laŭ la historiistoj troviĝas ĉirkaŭ la jaro 218 a.K. je la alveno de la romianoj, kiuj konstruis ĝin kiel fortan citadelon, de kie devenas ĝia nomo Tarako. Pli poste ĝi fariĝis ĉefurbo de la romia provinco "Hispania Citerior". Ĉie tra la urbo kaj ĉirkaŭaĵoj oni povas admiri la glorajn spurojn de tiu epoko.

Post la sinsekva regado de visigotoj kaj araboj, la urbon konkeris la armeo de la Barcelona grafo kiu transdonis ĝin al la barcelona episkopo Oleguer.

La urbo de tiam fariĝis eklezia ĉefurbo de Katalunio, rango kiun ankoraŭ posedas ĝis nun.

Menciindas la Katedralo kiu datiĝas de la jaro 1171, majstra verko transirstila kun romanikaj kaj gotikaj elementoj.

La monumento al la kataluna admiralo mezepoka Roger de Llúria ĉe la Mediteranea balkono en la "Rambla Nova" fariĝas la simbolo de nia kongreso.

**VENDREDON 1.11.91**

| | |
|---|---|
| 10.00 | Akceptado de kongresanoj kaj disdono de dokumentoj (Universitato-Placo Imperial Tarraco, 1) |
| 12.00 | Oficiala inaŭguro de la Kongreso (Urbodomo-Placo de la Font) |
| 16.00 | Prezento kaj unua prelego pri la kongrestemo (Universitato) |
| 19.00 | Prelego de sovetia aktivulo |
| 22.00 | Vespera renkontiĝo kun balo en la festsalono de "BarQuet" (str. Gasòmetre, 16) |

**SABATON 2.11.91**

| | |
|---|---|
| 10.00 | Dummatena ekskurso al la monaĥejo de Poblet (La aŭtobuso (j) startos de antaŭ la kongresejo |
| 16.00 | Dua prelego pri la kongrestemo (Universitato) |
| 18.30 | Asembleo de nia Asocio |
| 22.00 | Arta Vespero en la sama festsalono (Gasòmetre, 16) |

**DIMANĈON 3.11.91**

| | |
|---|---|
| 10.00 | Debato kaj konkludoj pri la kongrestemo (Universitato) |
| 11.30 | 31aj Internaciaj Floraj Ludoj. Festparolos William Auld. (Universitato) |
| 14.30 | Kongresa bankedo en Restoracio BarQuet-Gasòmetre, 16 Legado de la Kongresrezolucio kaj adiaŭo. |

Ni ĝoje informas, ke estas konfirmita la partopreno de la sovetia esperantisto Aleksandr Melnikov, ĉefdelegito de UEA kaj elstara aktivulo, kiu prelegos pri aktuala pedagogia temo. Ni fidas, ke la nuntempa politika situacio en lia lando ne malhelpos lastmomente lian ĉeeston.

Ni antaŭvidis tamen, ke li prelegu pri la nuna situacio en sia lando en diversaj katalunaj urboj dum la semajno antaŭ la kongreso. Ni atendas tiucele la inviton de la grupoj aliĝintaj al KEA.

Konfirmiĝis ankaŭ la ĉeesto de estraranoj de Monda Turismo, kiuj okupiĝos pri la prezento kaj prelegoj de la ĉi-jara kongrestemo Esperanto kaj turismo.

Dum la arta vespero oni antaŭvidas la kunlaboron de pola muzik-ensemblo, kio baldaŭ konfirmiĝos.

Anonciĝis la partopreno de diverslandaj esperantistoj, ĝis nun el Britio, Italio, Litovio, Pollando (karavano organizita de Esperantotur) kaj Sovetunio (12-homa grupo).

Sendube memorinda kongreso atendas nin. Aliĝu tuj!

**JUNULARA RESTADEJO**

Oni disponigos senpagan aŭ tre malmultekostan tranoktejon por la junaj gekongresanoj. Kunportu dormsakon kaj nepre mendu vian lokon en la aliĝilo.

**BANKEDO**

La bankedo okazos dimanĉon la 3an de novembro je la 14'30 h. en restoracio BarQuet, str. Gasòmetre, 16 laŭ jena menuo: "Fideuejat" (vermiĉela speciala plado) "Romescu" (sepio kun terpomoj kaj saŭco "romescu")Deserto, pano,vino,akvo kaj kafo (prezo 1.900 p-toj)


VERONA '92

# EŬROPA KONGRESO DE ESPERANTO
## 5 - 10 junio 1992

Temo : "La interkomunikado en Eùropo".
Provizora programo:
Vendredon,5an de Junio/Alveno de la kongresanoj;interkona vespero
(akceptado ĉe la fervoja stacidomo + aùtobusa servo al la kongresejo)
sabaton,6an de Junio:
11.00h:kongresa festparolado,vizito al ekspozicioj,malgranda regalo
posttagmeze : lanĉo de paraŝutistoj en la urbocentro 15.00h:Urbovizito,folkloraj spektakloj
20.30h:Distraj programeroj
dimanĉon,7an: dum la tuta tago kunvenoj je 20.30h:Teatra vespero
lundon,8an : 9.30h:daùrigo de la kongresaj laboroj 10.30h:Kunveno de Eùropa Esperanto-Unio
14.30h: Kunveno pri la kongresa temo (kun samtempa tradukado por ekstermovadaj instancoj).
20.30h:Subĉiela balo en la parko kun orkestro
mardon,9an: Konkludo de la kongresaj laboroj 14.30h:Ekskurso al Garda Lago
merkredon,10an: Tuttaga ekskurso

Prezo por kompleta pensiono en la kongresejo (400 litoj disponeblaj):tage inter 250 k. 340F.
Aliĝkotizo: ĝis 31.12 : 320F ĝis 15.05:410F poste:460F Por junuloj kaj familianoj:50%a rabato.

****************************************************************************************



# VIENO
romantika imperiestra metropolo
dinamisma moderna urbego

invitas al 77-a Universala Kongreso de Esperanto
Kongresejo: Aŭstria Centro – 25 julio - 1-a aŭgusto 1992

Pro la situo de Vieno, oni a-tendas 4-5.000 kongresanojn. Antaŭ- kaj Postkongreso okazos eble en Prago kaj Budapeŝto. Por 1992 oni finfine decidis kongresi en Valencio (Hispanio).

Aliĝkotizoj (ĝis 31/12 -31/03/92 kaj poste)
Individua membro de UEA : 552F, 690F,828 F.
Ne-individua " 690F, 828F,966 F.
Kunulo,Junulo,handikapulo individua membro de UEA : 276F, 414F, 552F
" " " ne-individua membro : 414F, 552F, 690F
Peras la aliĝojn UFE

****************************************************************************************

5a Pacifika Kongreso de E° en QINGDAO (Ĉinio) de la I7a ĝis la 22a de Aùgusto I992
Aliĝkotizo sen perioda rabato : 420F Pluraj antaù- kaj post-kongresoj estas antaùviditaj
La Turisma kongresa servo de UFE organizos komunan vojaĝon: 2 aù 3 semajnoj...

****************************************************************************************

## Dua Afrika Kongreso de Esperanto

27-a de decembro 1991 – 2-a de januaro 1992 en Benino

Konstanta adreso: UEA, Afrika Agado
p/a H. Bakker
Kastelenstraat 231
1082 EG Amsterdam, Nederlando

UEA, kunlabore kun Esperantotur, organizas partoprenon de eŭropanoj en tiu kongreso, kiu okazos jarfine dum unu semajno. La datoj povas ankoraŭ ŝoviĝi iomete, depende de flughoraro. La loĝado okazos en neluksa sed komforta kaj pura restadejo. Postkongresa vizito al aliaj landoj estas planota. Proksimume dusemajna vojaĝo – kiu konsistas el kongresa partopreno, plus postkongresa ekskursvojaĝo – devus kosti ne pli ol 3200 ned. gld., kondiĉe ke aliĝos sufiĉe multaj.

UN

MONDA JARDEKO POR KULTURA EVOLUO
WORLD DECADE FOR CULTURAL DEVELOPMENT
ВСЕМИРНОЕ ДЕСЯТИЛЕТИЕ РАЗВИТИЯ КУЛЬТУРЫ

RUSA SESIO
de la
AKADEMIO INTERNACIA DE LA SCIENCOJ
SAN MARINO
"LINGVO - KULTURO - EKOLOGIO"

1991-12-29 Moskvo — 1992-01-08 Leningrado

◆◆◆◆◆◆◆◆◆◆◆◆◆◆◆◆◆◆◆◆◆◆◆◆◆

# La Papo parolis en Esperanto

Dum sia publika parolado en Częstochowa (Pollando) antaŭ unu miliono da gejunuloj el la tuta mondo, la 15-an de aŭgusto 1991, la Papo Johano Paŭlo II eldiris jenan mesaĝon en pluraj lingvoj, inkluzive de Esperanto. En la komenco de sia parolado li diris «Mi donas ankaŭ en Esperanto bonvenan saluton al la junaj pilgrimantoj el la tuta mondo, en ĉi tiu tago de universala frateco, kiu vidas nin unuigitaj kiel filoj de unu sama Patro en la nomo de Kristo, vero de la homo!», kaj ĉe la fino «Karegaj junuloj! La sperto de kredo, travivita ĉe la piedoj de la "Nigra Madono", restu neforigeble gravurita en viaj koroj. Sanktega Maria akompanu vin!».

Kvankam en la pasinteco jam kelkaj Papoj esprimis sian aprecon al Esperanto, tamen estas la unua fojo, ke la supera



gvidanto de la Katolika Eklezio parolas en la Internacia Lingvo.

Se oni konsideras la moralan pezon de la evento kaj ĝian propagandan valoron por Esperanto, verŝajne temas pri unu el la plej elstaraj sukcesoj de la internacia lingvo en ĝia historio.

El "Heroldo"

**FEDERACIA AUTUNA KUNVENO en SETE, la 15an de Septembro 1991**

Laboretoso dum tiu kunveno, kiu okazis en "Centre familial du Lazaret", je la fino de la "Internacia Semajno" organizita de F-ino Yvette Vierne. Partoprenis ĉirkaŭ dudek respon--deculoj el Montpellier, Béziers, La Canourgue, Combejean-Pierrerue, Aigues-Vives, Durban, Lunel, St Mamert, Peyriac de Mer, St Pierre la Mer, Perpignan, St Félix de Rieutort (inter ili dekunu el la dekses komitatanoj; senkulpiĝis JA kaj BH; ne ĉeestis RA, CC, AR).
Kiel kutime la prezidanto JH bonvenigis ĉiujn nome de la estraro kaj legis la tagordon.

Raportoj pri someraj eventoj:
Internaciaj semajnoj en Habère-Poche kaj Sète : vidu la kompletajn raportojn en la bulteno. Ŝajne ne okazos la semajno de Habère-Poche en 92 (loko jam rezervita) sed du semajnoj estas planataj en Sète.
Universala kongreso de Bergen (Norvegio): pluraj federacianoj partoprenis. Nia samideanino A.Gaussen rimarkis la utilecon de esperanto por interkomprenado.
Vizito de Hungaraj geamikoj per aŭtobuso: ili haltis en Mauguio, Perpignan, ktp. La informoj ne bone "vojaĝis" inter la grupoj de nia federacio.
Hispana kongreso en La Laguna/Kanariaj insuloj : Sro LLech-Walter raportis.
Nacia Muzeo en Gray: nia sekretario vizitis ĝin. La Muzeo eldonis novan flugfolion. En Gray mankas indikiloj.
Vizito de kvar junaj Hungaroj: ili vizitis La Canourgue, Rodez, Toulouse, Barcelona, Perpignan, Mauguio, Toulouse kaj poste Italion (plurfoje lastminutaj aranĝoj).

Planoj por 91-92:
Multaj rendevuoj. Unue en Tarragona komence de Novembro (Kataluna kongreso). Poste renkontiĝo en Peyriac (ĥorsemajnfino). Semajnfino en Ariège kaj tutsemajna staĝo en Februaro (k.skiado) Detaloj aperos en la bulteno
Staĝo je ĉielirado en aŭ apud Béziers : la grupo pridiskutos la aferon. Eble kiel en 91 dum 4 tagoj (se partoprenos la federacianoj) aŭ nur dum semajnfino. La staĝejo 91 perfekte taŭgis sed ne estos disponebla en 92
Buseto transportas el Nîmes al diversaj E°-aranĝoj.

Unesko-klubo: Interesa eksperimento en Nîmes, la UK de Bergen pritraktis la temon. Por pli da informoj, kontaktu S-inon Gaussen, kiu spertas pri tiu fako.

Bulteno "Sudfrancia Stelo": Redaktas ĝin JH, presigas kaj ekspedas Sro Capus. Bonvolu sendi redaktitajn kaj korektitajn artikolojn (en "normala" lingvaĵo) kaj atenti la limdaton.
La abonkotizo restas la sama (25F); la grupkasistoj estas petataj ne prokrasti la sendon de la kotizoj. Adreso de nia kasistino: S-ino Négron 40, Chemin des Amandiers 34400 Lunel
Poŝtĉekkonto de la federacio: 956 28 P Montpellier.

Mondhejmo: La federacio donacis 3000F lastjare por helpi la konstruadon de la domo. Efektive ni konstatis, ke iom post iom la domo pliboniĝas. Unuanime ni decidis pagi ekde nun la jaran kotizon (50F). Eventuale ni provos aranĝi tie junulrenkonton.

Reordigo de la komitato: Grava afero; por pli efiki nia federacio devas havi fakajn responde--culojn. Post diskutado, la taskoj estis didonitaj. Estas nur propono, sed se ĉiu komitatano prenas sur sin iniciativon, ni certe progresos (la literoj rilatas al la nomoj de la listo).

Rilatoj kun gazetoj, radioj: LE, AG
Junularo: Sino Petitpas (Uzès), BH
Perkoresponda kurso: CC, AG
Lernejoj: Sro Bénazet, AG, JH
Nacia kongreso (kial ne?): JH, CG, LE
Peto de subvencioj: JB, CC
Libroservo: CG+helpantino
Mondhejmo: LE, CC
Staĝoj: YV (Habère-Poche+Sète) SA, FT, J.P.Peray
Federacia kongreso: 92: LE+Montpellier
Rebato: JA, JH
Turneoj: JB, LE

Tiu listo ne estas kompleta; ĉiu esperantisto rajtas sin aldoni.
Ni bone laboris en Sète; nia federacia kongreso okazos meze de Majo en Montpellier (La Paillade). Ne forgesu sendi al la redaktoro de nia bulteno informojn pri via loka klubo, pri via agado. Ĝis!

La sekretario : Charles Gérard-Voinçon

********************

Kompletigaj notoj:

Sro Capus realigis tri novajn panelojn (formato: 80x60cm) por ekspozicioj, forumoj, ktp. Ili estas sur fortika materialo kaj kompletigas la jam ekzistantajn panelojn. Kompreneble ili estas je ĉies dispono. Ni varme dankas nian sindoneman samideanon.

*******

Fine de Novembro vizitos nian regionon juna paro el Kazaĥlando (Sovetunio). "Jomart kaj Nataŝa" ankaŭ partoprenos la Festivalon de Parizo, ĉar ili bele kantas (ili jam registris kasedon). Eble via grupo invitis ilin.
Fine de Januaro aŭ komence de Februaro, vizitos nin S-ino Chank Sook Wai el Malajzio.
Ne forgesu inviti ĵurnalistojn por la vizitoj de tiuj nekutimaj vizitontoj.

*****

# MONTPELLIER

Kiel pli frue la kunvenoj okazas la unuan merkredon de ĉiu monato en La Paillade - Centre social,410 Avenue de Barcelone.
La ĝenerala kunveno okazis la 2an de Oktobro.Ĉi-malsupre,raportoj pri la "semajnoj",kiuj estis denove sukcesaj. Gratulojn al Yvette VIerne kaj la kurs-gvidintoj.

15a internacia semajno de esperanto en la familia domo "Vivĝojo" de Habère-Poche (24a ĝis 31a de Aùgusto I99I)

49 partoprenantoj el 11 landoj (Aùstra--lio,Rusio,Bulgario,Italio,Hispanio, Luksemburgio,Belgio,Germanio,Svislando, Irlando,Francio).
3 diversaj kursoj gvidataj de Carla de Lorenzi,Ilona Koutny kaj Alain Fabre, ĉiuj tre interesaj ĉar variaj : disku--tado,gramatikaj punktoj,aùskultado de sonbendoj,ekzercoj kaj ludoj.
La etoso estis bonega ĉar amikeca,la manĝaĵoj bonegaj;ni ekskursis ĉiujn posttagmezojn dufoje piede al monto proksima,al Abondance (klostro vizitin--da) kaj lageto,al Thonon-les-Bains,al lagbordo,al potisto.La vetero estis belega dum la tuta semajno,sen iu ajn nubo kaj la temperaturo tre agrabla (ĝis 28°C posttagmeze).
2 vesperadoj estis organizitaj de la familia domestro (lernigado de dancoj, kabareda vesperado kun partopreno de kelkaj esperantistoj kaj kelkaj ne-es--perantistoj);4 vesperadoj por nur esperantistoj,prizorgataj de la Ruso Ivan Popov,de la franca kantisto Roland Guetat (kun tre poeziaj,tre fakaj kanzonoj,kelkaj eĉ porinfanaj)kaj de tri Aùstralianoj,kiuj prezentis sian landon kaj kelkajn tieajn popolkantojn tre ŝatatajn de la aùskultantaro.
Entute,tre ĉarma kaj agrabla restado, espereble almenaù same profitdona kiel la antaùaj kaj venontaj,ĉu denove en Habère-Poche,ĉu en Sète.
12 homoj jam aliĝis al la Verona E°-kongreso.

Louis Ensuque

*****

*La federacio atribuis al la "Semajno" subvencion por la partopreno de la Ruso.*

***

*Aùtobuso kun kvardeko da junaj Hungaroj haltis dufoje en MAUGUIO dum Aùgusto, je la invito de Esperantistoj.*
*Je la reveno de Hispanio la urbestraro akceptis ilin kaj regalis ilin per honorvino. Dufoje ili dormis senpage en la loka municipa gimnastejo.*
*Ni ne ricevis raporton de la kontaktitaj personoj,sed raporto aperis en la gazetaro kaj ni esperas aperigi ĝin en la venonta bulteno.*

***

LANGUES

## L'esperanto en vallée verte



*Ilona Koutny, en démonstration avec Multivox fonctionnant sur IBM PC*

"Le Dauphiné" (Haute-Savoie) du 28/8/91

Comme chaque année, le centre familial « La joie de vivre » à Habère-Poche accueille une semaine d'étude sur la langue internationale

La cinquantaine de participants qui se répartissent entre les trois cours viennent des pays les plus variés, parmi lesquels il faut noter l'Australie et la Russie. La diversité d'origine des enseignants eux-mêmes contribue largement à créer ce climat d'internationalité, indispensable à la réussite d'une telle rencontre.

Cette année la présence du Dr Ilona Koutny linguiste attachée à l'université Eotvos Lorand de Budapest, permet la présentation et l'utilisation d'un logiciel couplé avec un synthétiseur de parole unique au monde : l'ordinateur dicte, parle avec son utilisateur, lit le texte frappé et propose des exercices rendant encore plus attrayant l'apprentissage de l'espéranto.

En dehors de l'informatique, où cette langue n'est d'ailleurs pas seulement utilisée à des fins pédagogiques (traduction automatique par exemple) des utilisateurs nouvelles voient le jour où se développent comme chez les radio-amateurs ou tout simplement les congrès scientifiques. L'ouverture de l'Europe l'Espéranto est très forte depuis les origines offre des perspectives commerciales et touristiques qu'il ne faudrait certainement pas négliger.

Si avant la fin de la semaine, vous avez l'occasion de passer par Habère-Poche, n'hésitez pas ! Une escale à la « Joie de vivre » sur la route du col de Cou, vous permettra de découvrir non seulement une application bien particulière de l'enseignement assisté par ordinateur mais aussi un échantillon de la richesse du monde espérantiste. Et vous pouvez aussi contacter LEA, l'Association espérantophone du Chablais, dont le siège se trouve à Massongy : 50.94.14.57.

***

Dum la kunveno la prezidanto JH denove petis,ke la komitato trovu anstataŭanton,inter la junaj kaj kapablaj homoj kiel JB,LE,ktp.
LE (Louis Ensuque) konsentis deĵori kiel vicprezidanto,la komitato unuanime aprobis. La federacia kongreso konfirmos tiun decidon. Gratulojn al LE !

***

FEDERACIO DE LANGVEDOKO - RUSILJONO

LISTO DE LA KOMITATANOJ KUN ADRESOJ (Okt.9I)

JA : Jean AMOUROUX 1,Rue de Sorède 66100 Perpignan Tel.68 67 41 27 (vespere)
RA : Ramos ANSON 24,Rue René Cassin 66270 Le Soler 68 92 73 88
SA : Suzanne AUTHIER 9,Rue Georges Picot 34500 Béziers 67 31 13 18
JB : Jeannine BONY Rés.Près d'Arènes C36/247 Rue F.de Lesseps 34000Montpellier
CC : Claude CAYZAC BP7073/34080 Montpellier
700,Chemin de Bellevue 34820 Assas 67 59 55 74
LE :Louis ENSUQUE 7,Rue Gustave 34000 Montpellier 67 58 64 18 (hejmo)
67 40 29 08 (laborejo)
AG : Andrée GAUSSEN Rue de la Galinière 30730 St Mamert 66 81 14 94
CG : Charles GERARD-VOIÇON 4,Rue Dr Rives 66000Perpignan68 55 51 77 (hejmo)
68 61 32 40 (laborejo)
BH : Brigitte HENIN Beauregard Rte de Montcayroux 48500 La Canourgue
JH : Jean HENIN Beauregard Rte de Montcayroux 48500 La C/66 32 86 36 (hejmo)
66 32 81 54 (laborejo)
RL : René LLECH-WALTER 72,Av. du G-al de Gaulle 66000 P 68 34 22 18
LN : Lucette NEGRON 40,Chemin des Amandiers 34400 Lunel 67 71 05 79
AR : André ROCHER Immeuble Concorde C10,Av.de Laguiole 12500 Espalion
65 48 16 02
FT : Fernande TERRAL 17,Rue Gratiolet 34500 Béziers
AT : Annick TORA Rue Saline 11440 Peyriac de Mer 68 41 28 15
YV : Yvette VIERNE 5,Rue Docteur Roux 34000 Montpellier 67 54 15 43

Aliaj adresoj de aktivuloj:
André CAPUS 15,Rue des Frères Platter 34000 Montpellier 67 63 15 21
JORGOS (Georges COMTE) 09120 St Félix de Rieutort 61 60 86 83
Jean-Pierre PERAY Combejean-Pierrerue 34360 St Chinian
Paul TOURON 3,Rue de Combret 30000 Nîmes 66 64 03 22

**PROPOS DE RENTREE:**

Que d'évènements ces dernières semaines! Bien sûr,ce qui s'est passé à l'Est est capital mais ce qui se passe actuellement en Yougoslavie,pays où nous avons souvent des correspondants ou des amis, est douloureux et inquiétant pour l'avenir. "Estas normale en pluretna,plurlingva,plurreligia lando" disent certains...

Les hommes sont-ils condamnés à se combattre? Nos politiciens et leurs propos sur les Japonais ou les immigrés nous entraînent-ils vraiment à la tolérance?
Permettez-moi d'en rester au problème des langues dans notre quotidien... La plus grande nouvelle est peut-être l'obligation faite à tous les jeunes Britanniques d'apprendre au moins une langue étrangère (1° Janvier 93 oblige!).Ce n'est pas encore une pratique universelle,témoin cette proposition venue d'Amérique de faire correspondre des jeunes. Louable intention mais il est précisé que leurs élèves ne peuvent correspondre dans une langue étrangère...To participate we only need for you to send us a list of students who can correspond in English. (Unfortunately, our USA students aren't able to correspond in a foreign language.) Aux autres de se débrouiller,voyons!
La manie anglo-américaine a connu des sommets avec le catalogue "Top rentrée" de la chaîne de librairies "Trèfle vert".Le magazine pour jeunes "I love English" y donne de judicieux conseils :allez au restaurant dans un "fast-food"...-allez dans un vrai restaurant américain,vous en trouverez sûrement un dans votre ville...Il est également indiqué que l'anglais est la plus riche des langues du monde avec 700 000 mots et que nos jeunes, s'ils sont vigilants,en connaissent déjà des centaines. La route est longue...

L'introduction des langues étrangères à l'école primaire avait laissé croire à beaucoup que le problème des langues était réglé. Voyez ce qu'en dit "L'Ecole libératrice" qui avait publié, il n'y a pas si longtemps, un dossier sur l'E°.Ne estas la horo por rezigni! J.H.

● ***L'extension des langues vivantes à l'école est hypothéquée par une absence de politique cohérente.***

Sous-estimation des difficultés d'organisation et de fonctionnement dont les directeurs d'école et les enseignants assument les retombées, non-maîtrise de l'Éducation nationale sur certains intervenants et sur certaines *«politiques locales»*, insuffisance de formation.

En l'absence de politique cohérente et continue, les suppressions de postes comme les restrictions sur les décharges de direction hypothèquent l'extension des expériences de langues vivantes à l'école primaire. Quant au silence ministériel sur l'échéance et les moyens de la généralisation, c'est un obstacle majeur.



## INTERNACIA SEMAJNO EN SETE

En "Le Lazaret" de Sète, de sabata vespero la 7a de Septembro okazis "INTERNACIA SEMAJNO" ĝis la 14a de Septembro. En tiu staĝo aliĝis 65 homoj el Francio, Italio, Svisio, Germanio, Pollando, Hungario kaj Aŭs--tralio. Vizitis ankaŭ Katalunoj.
Gvidis bazan kurson Carla de Lorenzi (I) per rekta metodo de T.Sekelj (fama hungara jugoslavia etnologo) kun multaj ludoj, kantoj kaj lumbildoj.
Paroligan kursaron prizorgis Ilona Koutny el la Budapeŝta Universitato, kie ŝi verkis E-lingvan komputilan programon ESPAROL el la serio de sintez-parolaj komput-programoj MULTIVOX.
Pierre Babin (estro de MCE Greziljono) studi--gis de la fluparolantoj verkon de D.Moirand "Murdo en Esperantujo"; ĉiuj staĝantoj studis matene de la 9a ĝis la 12a kaj ankaŭ antaŭ vespermanĝoj dum unu horo kaj duono.
Posttagmezaj ekskursoj okazis al:
-(bedaŭrinde) ne E-budo en Montpellier -urbo Sète
-pertrajneta veturado al ŝipo travidebla sur "Etang de Thau" (duonsukcesa pro avidaj ŝip-estroj)
-"Centre de Lagunage" : repurigado de akvaĉoj dank'al vento, suno, algoj... ...ankaŭ fiŝ- kaj marestaĵ-bredado
-Pézenas (urbo de Molière)
Ankaŭ publikaj prezentadoj de Esparol-programo anoncitaj de "La Marseillaise" k. "Midi Libre".
Vesperumoj estis vigligataj de Max Wearing (Aus), Carla (I), S-ano Stakian (CH), Detlev (D/O), Jorgos (F/09) per kantigo, dancigo kaj ludigo (eĉ ĝis la...3a nokte!)
Prezentiĝis ankaŭ -E°-agado ĉe Unesko;
-E°-centroj (Grésillon, Mondhejmo);
-Esperantologiaj kursoj tra la Budapeŝta Universitato.
Jorgos krome prizorgis buntan libroservon kun ankaŭ kasedoj, glumarkoj, T-ĉemizoj, poŝtkartoj, pinĉoj k.a. Plie okazis publika debato pri E° post video-bendo pri Villefranche s/ Saône.
Ne okazis gazetara intervjuo sed "Le Midi Libre" tamen aperigis grandan parton de la de ni provizita artikolo.
Ege notinda estas, ke pli ol dudek komencantoj (ĝis 1 jaro), dek junuloj (ne ĉiuj junaĝaj) donis certan freŝan etoson kun interalie ĉiunokta banado. Venu, venigu al Sète !

Raportis Jorgos.

"Midi Libre" 11-IX

# Un stage d'Espéranto au Lazaret

■ Samedi, une nouvelle « Semaine Internationale » a débuté au centre familial du Lazaret, à l'initiative du Centre Espérantiste de Montpellier.

Une soixantaine de personnes s'y sont inscrites, venant non seulement du Languedoc et d'autres régions de l'hexagone, mais aussi d'Italie, d'Allemagne, de Pologne, de Hongrie et même d'Australie.

Les personnes qui ont déjà commencé l'étude de l'Espéranto depuis au moins un an et ont besoin de parler, se retrouvent chaque jour à 9 h et à 17 h 45 avec Ilona Koutny, qui enseigne à l'université de Budapest. Elle est spécialisée en langues et en informatique. Ilona présentera d'ailleurs aux stagiaires – et à toutes les personnes intéressées – son programme informatique qui fera parler un ordinateur IBM en Esperanto.

Rendez-vous est pris avec elle pour ce mercredi à 14 h 30 au Lazaret. Par ailleurs, un troisième groupe travaille avec P. Babin, directeur de la Maison Culturelle Espérantiste de Grésillon (à Baugé - M & L); avec lui, les « flu-parolantos » (=ceux qui parlent couramment) étudient un roman policier de D. Moiran, professeur à l'université d'Aix-en-Provence.

Tous les après-midi, les stagiaires visitent la région et ont le soir un programme de distraction culturelle.

***

*Vizito de Ĉino :*

*En la oktobra numero de "El Popola Ĉinio" Sro Wang Xigeng raportas dupaĝe pri sia vojaĝo tra Francio dum la aŭtuno 90a. Li ankaŭ haltis en nia regiono, kie li havas geamikojn (SFS jam parolis pri li) Interese, ke li rimarkis, ke Esperanto interesas multajn francojn. Ni konkretigu tiun intereson !*

Mi trovis, ke Esperanto interesis multajn francojn. Ĉie, kie ni estis, francoj demandis, kian lingvon ni parolis. Francaj esperantistoj ĝoje diris al ni: "Vi alportis al ni ne nur la brilan ĉinan kulturon, sed ankaŭ la Esperantan vivforton." Aŭskultinte mian konigon pri la disvolviĝo de Esperanto en Ĉinio, la urbestro de Boissy Sous St. Yon tuj promesis al la lokaj esperantistoj: "Por subteni la pacan internacian lingvon, ni favoros disvolvon de via Esperanta aktivado per salonoj de la urbodomo." En la kolegio de la Universitato St-vrain mi diris en la prelego, ke ni ne parolas la francan lingvon nek la anglan kaj dum nia vojaĝo en Francio nur Esperanto helpas nin. Tuj post mia prelego deko da lernantoj sin anoncis al sia instruisto por lerni Esperanton. Tuj kiam ni atingis Lionon, ĝia televida stacio raportis pri la televida kurso de Esperanto funkciigata de la Centra Televizio de Ĉinio, telesendis parton de la filmo pri la instruado kaj konigis, kiel la ĉina registaro alte taksas kaj subtenas la Esperantan laboron.

En Francio multaj francaj esperantistoj varme akceptis kaj helpis nin, kio montris la sinceran amikecon de la franca popolo al la ĉina popolo.

La pli-ol-80-jaraj geedzoj Lantaigne korespondis kun mi ĉ. dek jarojn. Ili multe kuraĝigis kaj helpis min en mia lernado de Esperanto. Informiĝinte, ke ni estis vojaĝontaj de Clermont-Ferrand al Nimes, ili malgraŭ maljuneco kaj pluvo trajne veturis de Montpllier al la stacio de Nimes, tie atendis du horojn por bonvenigi nin kaj hejmen revenis vespere. Ni gaje pasigis du tagojn kune kun ili.

*******************************************

Z E O :Zamenhof-esperanto objekto
Sro Boré, UEA delegito en Chambéry, regis--tris 115 diversajn ZEOjn en 47 francaj departementoj.
Se vi ŝatus, ke via urbo aŭ departemento posedu sian ZEOn (straton, parkon, placon, ktp), skribu al via urbestro.
Petu de Sro Boré, 481 Square Zamenhof 73000 Chambéry modelan argumentitan leteron kun la listo de la II5 ZEOj

*********

M I N I T E L O : Eble vi jam provis 3615 Esperanto.
Ankaŭ provu 3614 PING aŭ 3615 PONGPING
Kun 3613 17506032402 vi disponas pri senpaga E°- kurso
SFS ne garantias la ĉi-suprajn informojn...

*

Vilhelmo Lutermano:
*Iom pri la literatura staĝo gvidata de Petro Babeno*[1]
(Seta[2] Internacia Semajno, septembro 1991)

*Parto unua*

Ni dekkvin kursanoj legis iom atente la romanon de Danielo Mùarando[3]: Murdo en Esperantujo, krimromanon, kiun ni unuanime laùdis pro ĝia streĉa disvolvo de la enigmo, pro ĝiaj interesaj karakteroj kaj pro sukcese integritaj du ĉeftemoj: amo, eĉ amoro, kaj la internacia lingvo mem (la enketanta policisto, simpatia homo, sed kontraù Esperanto, ne nur spertas feliĉigajn rilatojn kun geesperantistoj, sed eĉ mem Esperantistiĝas).

La stilo estas tiu de tradicia krimromano, simpatia rakontado kun iom troa, ĉar ne ĉiam funkcia detalemo: detalaj priskriboj okazas ofte hazarde, nur ĉar ili plaĉas al la aùtoro, mankas ja ofte ia rilato al la romankoncepto. Tio povas foje iom ĝeni, ĉar oni atendas disvolviĝon de io surpriza en la detaloj; sed post kelkaj ĉapitroj oni jam kutimiĝas al tio, kaj tiam oni nur ridetas pri tio aù ankaù senĝene plezuriĝas je detalaĵoj, kiam ili estas bele priskribitaj.

La lingvo estas ĝenerale flue legebla; sintakso kaj kunmetaĵoj montras, ke temas pri sentema aùtoro, kiu ne hazarde elektas siajn vortojn.

Tamen ni ne povis pretervidi kelkajn lingvajn malbelaĵojn, eĉ erarojn - sed ĉe tiu aùtoro (kiu ja verkis ankaù la ampleksan studon pri la akuzativo) oni certe ne povas paroli pri eraroj: temas pri «malfeliĉaj» lingvaj decidoj, kiuj plejparte ne koncernas nur lin mem, sed tutan grupon da aùtoroj, kiuj verkas laù samaj aù similaj lingvaj decidoj. Ĉar krome ni aùdis, ke la aùtoro intencis per tio verki laù stilo modela, mi opinias, ke ni atentigu ne nur la aùtoron, sed ankaù ties legantojn pri nia kritiko.

Li obsede anstataùigas la per «mal-» prefiksigitajn radikojn. Li ja tute ne estas sola en Esperantujo, li sekvas la vojon de Varengjeno[4], kiu en la tridekaj jaroj deklaris, ke tiuj «mal-vortoj» ne povas esti elvokivaj. Sed sufiĉas legi la 5-an kaj 6-an ĉapitrojn de Klaùdo Pirono[5]: «La bona lingvo» por kompreni, ke ĉiu homo trovas (almenaù komence) vorton el sia gepatra lingvo pli elvokiva ol vorton, kiun li unue devas lerni aù, se tio per logika vortfarado estas ebla (ekzemple per «mal-»), aùde kaj parole al si proprigi, do elvokivigi. Kiu volas eviti afiksojn, tiu etnigas la neetnan internacian lingvon, malesperantigas ĝin. Kial tiam ne tuj paroli france? Kaj la Varengjena PIVo estas jam tiom dika i.a. ankaù pro tio, ke ĝi enhavas multege da anstataùantoj por la prefikso «mal-». Nia aùtoro bezonis nur ĉerpi por trovi - plejparte francdevenajn - vortojn, kiuj por li kompreneble estas pli elvokivaj. Sed ĉu ankaù por Japanoj, al kiuj la lingvo ja samrajte apartenas? Cetere ne nur la inflacio de superfluaj vortoj (kaùzata de forigo de esenca parto de la Esperanta vortfarada sistemo) estas kontraù la spirito (kaj la Fundamento!) de la lingvo mem, sed tiaj estas ankaù la ŝajnaj afiksoj kaj radikoj de multaj el tiuj vortoj: «leĝero» estas ero de leĝo. Kvankam dekomence jam estis multaj tiaj vortoj en la lingvo kaj veraj konfuzeblecoj estas ege maloftaj, oni povas tamen diri: Ju pli da tiaj vortoj eniras la lingvon, des pli la leganto devas preteratenti la elementojn de la vortfarado: ĉiu tia vorto malfortigas Esperanton, etnigante nian lingvon.

Sed nia aùtoro evitas ne nur «malvortojn», sed ankaù aliajn kunmetaĵojn, se li, Franco, trovas vorton por li pli elvokivan, ekzemple «taùro» (virbovo). «brankardo» (kio ne estas ardo de branko, sed homportilo), kaj pro tio li eĉ ne hezitas trinki «rozan» vinon (do: vinon el rozoj) anstataù rozkoloran.

[1] Pierre Babin
[2] Semaine Internationale de Sete
[3] Daniel Moirand

[4] Warenghien
[5] Claude Piron

## BEZIERS

FORUMO DE LA ASOCIOJ - Aleoj P.Riquet
la 18an kaj 19an de OKTOBRO.

La datoj pri la venontaj kunvenoj jam aperis en la lasta bulteno (26 X - 30 XI je 14h30). Neniu ŝanĝo. Bedaŭrinde,ĝis nun ni scias nenion pri nia "transloĝiĝo" en la novan "Domon de Asocioj" (ĉu en Januaro?). Do,ŝajnas,ke ĝi ankoraŭ ne estas finpreta,kaj niaj kunvenoj okazos en Caserne St Jacques.
Rilate la Zamenhofan tagon,ni ĝin festos la 15an de Decembro. Kie? Neeblas diri.
Same ni ne povas precizigi la programon pro la necerteco pri nia kunvenloko.Kiam ni scios, ni informos la respondeculojn de la grupoj aŭ telefone aŭ perletere.
La kursoj daŭre funkcios. Tagoj kaj horoj estos interkonsente deciditaj en la venonta kunveno

*****

*Nia komitatatino kaj amikino Fernande Terral eldonigis duan poemaron.Gratulojn!*
*Ni esperas baldaŭ legi en SFS poemojn en Esperanto.*

***

MONDHEJMO
EKOLOGIA CENTRO INTERNACIA
kun Esperanto kiel oficiala lingvo

Nia komitatano LE reprezentis la federacion je la lasta ĝenerala kunveno en Aŭgusto. La laboroj bone progresas : la teretaĝo estas preskaŭ finita,la unua etaĝo estas en konstruo. Oni bezonas nun monon por fini la tegmenton antaŭ la vintro. En Januaro oni elektos novan estraron.Eble Claude Cayzac estos kandidato,eble ankaŭ LE.
La adreso de Mondhejmo estas 34360 Caŭduro Tel-n°:67 97 26 63 kaj laste la poŝtĉekkonto 54118V Montpellier (ĉiu povas fariĝi membro sed la asocio akceptas mondonacojn kaj seninte-rezajn pruntedonojn). E°-centro konstruiĝas en nia regiono.Ni kontribuu!

***

## NIMES

Unesko-klubo; VOJAĜO al NORVEGIO (25 VII-9 VIII 9I)
Preskaŭ tro por esti vera! Freŝa aero,maro kaj lagoj tiel klaraj kiel kristalo...
Mirindaj fjordoj,aŭdacaj reliefoj de la monto kaj senlimaj ebenaĵoj;tie la naturo vivigis al ni nekonatajn impresegojn,senton de libereco kaj bonstaton.
La beleco de tiu lando estas vere sublima.La loĝantaro vivas harmonie kun pasinteco kaj estonteco.
Bergen,enirejo al la fjordaro estas komerca urbo,ŝiptrafika urbo kun la mondo.La urbo tamen rakontas sian historion al la vizitantoj:preĝejoj el ligno interne pentritaj,kasteloj, malnovaj bluaj,ruĝaj,verdaj domoj ĉiam el ligno. Bergen estas juvelo en belega skatolo,kiel en Nîmes sep montoj ĉirkaŭas ĝin sed ĝi malfermiĝas ĉe maro.
Preskaŭ tro por esti vera. Tiu,kiu ne ĉeestis kongreson,ne povas imagi tiun internacian etoson,tiun profundan emocion,kiu premas vian koron,vian menson,kiam 2300 personoj el 60 landoj kompatas 72 Litovojn,kiuj ne povis elŝipiĝi. Dum duono de la UK,ili rigardis el la ferdeko de la ŝipo,kiel bestoj el la kaĝo rigardas liberecon ekstere.La ŝipo,kiu alpor--tis ilin estis taksata danĝera.La tuta lando Norvegio,kaj eble granda parto de la mondo parolis pri ilia aventuro..."ŝpiona ŝipo"...
Detali al vi la multajn diversajn prelegojn,kunsidojn,amuzaĵojn estus tro;vi povas kontakti UNESKO-KLUBO E° de Nîmes :66 81 14 94...sed ni ne povas silenti pri la Unesko-asocio fondi--ta ĵaŭdon la 8an de Aŭgusto 9I.La sekretario de Unesko salutis tiun kunvenon,en kiu parto--prenis 60 kongresanoj por la fondo de esperantista Unesko-asocio "MONDA KUNAGADO" por Eduko,Scienco kaj Kulturo. Nîmes fieras estis la unua Unesko-klubo por instruado de E° kaj internaciaj interŝanĝoj. MONDA KUNAGADO aktivas per konkretaj projektoj por paco kaj inter--nacia kompreniĝo,uzante la spertojn kaj eblecon de UNESKO kaj de la E°-medioj.
La E° Unesko-klubo de Nîmes provas organizi 2 vojaĝojn,al Verona (5-10a Junio 92 kaj Vieno 25a Julio-1a de Aŭgusto).Pri Verona via enskribiĝo urĝas (por detaloj,tel.66811494)
KURSOJ:por komencantoj ĉiun merkredon je la 15a h,ĉambro "Le Méridien",kvartalo Castanet en Nîmes (komenciĝis la 2an de Oktobro)
-kursoj 2 kaj 3 : Maison de l'Europe,lunde je la 15a h (ekde la 9a de Septembro)

***

*Ni multe dankas pro la interesa raporto;certe ni denove parolos pri MONDA KUNAGADO.*
*Aldonendas,ke 5 gejunuloj de la E°-Unesko-klubo partoprenos en la staĝo de La Roque d'Anthéron la 23an kaj 24an de Novembro.Pri tiu staĝo informas Sino A.Girardin,16 Rue des Amandiers 13640 La Roque d'Anthéron (limdato por aliĝi:la 10a de Novembro)*
*Fine,pri departemento GARD,ni menciu,ke la Generala Konsilantaro atribuis subvencion al la departementa federacio. Sekvinda ekzemplo!*

*****

# PERPIGNAN

*La klubanoj multe vojaĝis;ankaù haltis vizitantoj en Perpignan:kvardeko da Hungaroj, Japana kunlaboranto de Ludovikito,ktp...Sro Llech-Walter vizitis la Hispanan kongreson en La Laguna (Kanariaj Insuloj) dum Julio.*

Tiu kongreso okazis omaĝe al la memoro de la eminenta esperantisto,Regulo Perez,profesoro ĉe la Universitato de La Laguna.Partoprenis tiun kongreson Sinjoroj Johano Fernandez kaj Renato Llech-Walter el Perpignan.

Multaj interesaj kunvenoj;ĉe la fino de la kongreso,la oficialaj instancoj de la Kanariaj insuloj invitis la gekongresanojn por vespermanĝi en la belaj ĝardenoj de la "Casino de la Puerto de la Cruz".Agrabla vespero kun muziko kaj kantoj.La prezidanto anoncis la ĉeeston de veterano Llech-Walter,eksestrarano de UEA kaj Honora prezidanto de UFE kaj de nia fede--racio.Aplaùdoj sekvis kaj la "veterano" diris dankvortojn.

Resume, bela kongreso kun agrabla etoso kaj milda vetero.

*****

*Nia sekretario Charles Gérard-Voiçon vizitis la E°-muzeon de Gray;jen lia raporto:*

Dum Aùgusto mi vizitis la Nacian E°-muzeon en Gray (Haute-Saône/Franĉ-konteo).

Tie la kuratoro,Sro Junier,akceptis nin. En dek salonoj (230 m2)oni trovas imponan libraron, plurajn centojn da gazetkolektoj kaj diversajn dokumentojn pri Esperanto.

Dum unu horo ni vizitis la muzeon,kaj post la tradicia subskribo de la Ora Libro,ni foriris, kun la promeso al Sro Junier baldaù reveni.

La "Nacia Esperanto-muzeo de la franca esperantistaro" situas 19,Str.Victor Hugo 70100Gray. Malfermo ĉiumerkrede kaj ĉiusabate posttagmeze.

*Aperis antaù nelonge du faldprospektoj (unu en la franca,unu en E°)pri la Muzeo.Eble ni prezentos ilin en nia venonta bulteno (ĉiam problemo pro spacomanko!).Oni povas peti ilin ĉe la urba turismejo,B.P.89 70100 Gray,kontraù afrankita koverto kaj eventuale gratuloj pri tiu eldonaĵo*

*****

*Charles ricevos je la 27a de Oktobro bronzmedalon de la SEAB (Société d'encouragement au bien),kun la ĉeesto de persona reprezentanto de Sro Alain Poher,prezidanto de la Senato. La Federacio L-R gratulas lin varme je tiu okazo.*

*****

*Sanĝoj en "La Philatélie française",kie la kroniko de Jean Amouroux ne plu aperas regule. Anstataùe neregula sed pli moderna,kolora kaj okulfrapa prezento (ĉu io en la venonta SFS?) Jen alvoko de Jean :*

Mi serĉas fotojn el la filmo de Charlie Chaplin,"Le dictateur" ("La diktatoro).

En la koncerna filmo Chaplin rolas i.a. kiel kombisto-razisto en subpremita juda kvartalo kaj kiel diktatoro.

Sur iuj butikoj de la juda kvartalo aperas surskriboj en esperanto,eĉ se kun kelkaj eraroj kiaj:"lipharoj","kafejo","Vestajoj Malnovaj","cigaroj","cambroj","terpumoj"k.s.

Fotografaĵojn el la filmo montrantaj tiujn surskribojn mi bezonas.Kiu povas helpi?

J.Amouroux,1,Rue de Sorède 66100 Perpignan.

*****

PRELEGO je ĵaùdo,la 21a de Novembro (14h30),52,Avenue du Maréchal Foch ("Arts et Culture")

L'ESPERANTO
Nécessité d'une langue internationale, les tentatives
l'Esperanto : ses structures
organisation du mouvement espérantiste
Cette conférence sera animée par Mr. René BENAZET, retraité de l'enseignement public, enseignant l'Espéranto au centre culturel espérantiste de Perpignan.

## LOZERE-AVEYRON :

Du anoncoj...La unua (el"Monato")estas provo de neesperantista asocio uzi la internacian lingvon por kontaktoj (k.eble pli). La dua ne estas ekzakta.Tamen multaj junaj Orienteùropanoj volas malkovri nian landon pere de "Pasporta Servo".Estis ankaù multaj vizitoj ĉe aliaj gastigantoj en Montpellier,St Mamert,ktp.

Apartan dankon al la samideano,kiu malavare sendis monsumon por helpi hungarajn/gestudentojn.

En Rodez kurso funkcias ĉiumarde en la MJC (je la 20h30). 7 personoj komencis la kurson. Bonan sukceson al tiu entrepreno !

**Francio ★ Centra montaro ★ regiono Lozère.** Ne-esperantista organizaĵo deziras kontaktojn por interŝanĝo de infangrupo (ĉ. 20-30 anoj) dum 1 aŭ 2 semajnoj laŭ similaj kondiĉoj: kolektiva akcepto en oficiale aprobita centro kun instruistoj (sporto-malkovro de naturo, loka vivo kaj kulturoj). Skribu al: Moulin de la Farelle, F-48000 Balsièges.


*****

**Espéranto**

■ *Toujours très actif le cercle Espéranto de la Venise lozérienne a reçu des visiteurs de l'Europe de l'Est polonais, hongrois et roumains, ainsi que des jeunes tchèques se sont succédés. La nouvelle génération désire connaître ce qui se passe ailleurs...*

**Denove ekveturas**

# Pasporta Servo!



**1125 adresoj en 59 landoj.**
**Mapoj. Klarigoj.**
**Neprajo por la vojaĝema esperantisto.**
**Mendu ĉe UEA: 15,00 gld. (triona rabato**

## HELPU GEJUNULOJN fariĝante GASTIGANTO de PASPORTA SERVO !

Gastiganto simple disponigas liton aŭ kelkajn m$^2$ por dormi al junul(in)o(j),kiu(j) anticipe **anoncas** sin **k.petas konsenton.** La gastiganto mem decidas pri la kondiĉoj de akcepto.. Simple sendu (rapide,ĉar la venonta eldono nun pretiĝas) al TEJO/Pasporta Servo Nieuwe Binnenweg 176 NL3015BJ Rotterdam informojn pri vi-mem (adreso/aĝo),via urbo,pri viaj kondiĉoj (skriba aŭ telefona peto;kiom da gastoj kaj da tagoj,ktp). Antaŭdankas la esperantista junularo.

---

La venonta kongreso de TEJO okazos en Kanado (iom multekosta afero) sed ĉiujare je la jarfino okazas en Germanio la "ISO" (Internacia Seminario),kiu arigas plurajn centojn da gejunuloj kaj kiun ni povas rekomendi:




KIO NOVA ĉe niaj najbaroj ?

ARIEGE

Fine de Septembro en Larok' en Ulmio okazis duobla inaŭguro (migrad-pado+piknikejo).
Paroladis la urbestro,Sro Boré (Chambéry),ktp
Oni migradis,dancis,gustumis la "Munjetado"-n (ĝi estas tipa loka manĝaĵo el fazeoloj).
Fine de Oktobro estos ekspozicio en Castillon.
(Re)komenciĝis E°-kursoj en Pamiers,Kanterat'+Limoux (11), Arrout/Castillon,Larok'...
En la Freychède apud Montferrier estas antaŭvidita E°-staĝo pri ĥoro kaj skiado de la 23a de Februaro ĝis la 1a de Marto 1992. Gvidos la ĥoron Saskia IDZERDA (NL), estraranino de TEJO

*********

AVIGNON PROVENCE

La 12an kaj 13an de Oktobro okazis la oka E°-rendevuo kun P.Martinelli kaj G.Silfer. Nikolin' venis de Belgio por kanti.
Domaĝe,ke neniu informis nian federacion pri tiu veno!
Zamenhofa tago en Souvine la 15an de Decembro;prelegos Michel Duc Goninaz kaj Simone Humm.
Ni jam menciis aliloke (vidu sub Nîmes) la staĝon en La Roque d'Anthéron apud Aix (23an-24an XI).Gvidos la kursojn D.Moirand,A.Brest kaj P.Lagrange.

*********


ANONCOJ:

11jara Polino kaj esperantistino,kiu nun komencas studi en lernejo la francan lingvon volas korespondi kun samaĝuloj pri diversaj temoj.
Magdalena Staszewska-ul.Moniuszki 2/PL95-070Aleksandrów
(Ŝia patro vizitis nian regionon en Junio)

*********

TENDARAJ TAGOJ : Novstila lernolibro por 10-14jaruloj. Rolludetoj,multaj ilustraĵoj.La aŭtoro estas S.Mac Gill kaj ILEI peras tiun kajeron (la unua el tri aperontaj)
КОНТАКТ-ИНТЕР ТУР (Kontakt-Inter-Tur) proponas al vi allogajn vojaĝojn kaj ekskursojn tra Rusio.
La listo de la viziteblaj lokoj estas tre longa,de unutaga vizito de Moskvo (1200 rubloj kun grupo de 20/30) ĝis ripozsemajno surborde de Krimeo kaj Kaŭkazo.Ankaŭ oni povas aranĝi vizitojn de spektakloj,renkontojn kun esperantistoj...
Adreso:SU-103012 Moskvo/Str.Razina 2,Antonova O.N.

*********



# Distra paĝo

KRUCVORTOJ

| | 1 | 2 | 3 | 4 | 5 | 6 | 7 | 8 | 9 | 10 |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| I | | | | | | | | | | |
| II | | | | | | | | | | |
| III | | | | ■ | | | | | | |
| IV | | | | | ■ | | | | | |
| V | | ■ | | | | ■ | | | | |
| VI | | | | | | | | ■ | | |
| VII | | | ■ | | | ■ | | | | |
| VIII | | | | | | | | | ■ | |
| IX | | | | | | | ■ | | | |
| X | | | | | | | | | | |

HORIZONTALE

I) Ĉu ĝi faciligis la inspiron al Schubert ?
II) Elektromagneta maŝino.
III) Ankoraŭ / Ne malbele, sed tamen...
IV) Senfina monato / Ogapap ate.
V) Por vi kaj por mi / Necesa por Santiago, komence.
VI) Laŭvorte, duoble monstra ! / Prepozicio.
VII) Radiko, sendube ! / Liternomo / Renversita kaf.
VIII) Ĉu vampirismi ?
IX) returnite : Brita admiralo / Ankoraŭ.
X) Senfina fino de frakturo.

VERTIKALE

1) Plene surtera virino.
2) Koncernanta parton de la nutrokanalo / Direktos.
3) Marbirdo / Faras la profesiulon.
4) Dupunkto, laŭ Waringhien (Lingvo kaj Vivo) / Sonema sfereto.
5) Varsovi aŭ Barcelon / Molekula propraĵo.
6) Rusa senorda akvo / Ĉu enesti ?
7) Feliĉodonil.
8) Koncernanta inan organon / Greka litero.
9) Arkitekturaĵo / sone : Sorte akirita.
10) Timpan.

D-ro BERTHONNEAU.

---

-En la julia numero de "Panorama du médecin" Michel Laclos donas en siaj krucvortoj la jenan dekliteran difinon : "s'expriment en hommes du monde"
La solvo estas :"espérantistes". Bela kaj kuraĝiga difino,ĉu ne?

---

SOLVOJ de la N° 117a:

| | 1 | 2 | 3 | 4 | 5 | 6 | 7 | 8 | 9 | 10 |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| I | M | E | N | S | O | G | i | S | T | O |
| II | E | L | O | K | V | E | N | T | A | S |
| III | N | E | ■ | i | O | i | O | ■ | L | T |
| IV | S | K | E | ■ | J | Ĝ | ■ | O | P | E |
| V | O | T | R | A | ■ | i | O | L | ■ | J |
| VI | G | i | P | S | O | ■ | T | i | K | O |
| VII | i | L | i | O | ■ | R | A | T | O | ■ |
| VIII | S | O | L | ■ | L | A | B | O | R | i |
| IX | T | ■ | O | L | i | V | A | R | B | O |
| X | O | R | N | A | M | i | S | T | O | ■ |

RIMOJ kaj PROVERBOJ

ŝuo : le cordonnier est toujours le + mal chaussé
saĝo : On fait des folies à tout âge
La valeur n'attend pas le nombre des années
frakaso : une tempête dans un verre d'eau
manĝo : Trop tard à la soupe
kason : qui casse les verres, les paie
telero : Là où il n'y a rien,le diable (roi) perd ses droits
anseron : C'est un coup d'épée dans l'eau
silento : c'est le calme après la tempête
danĝera : C'est la lutte du pot de fer contre le pot de terre
pacienco : tout vient à point pour qui sait attendre
ofico : toute peine mérite salaire
aranĝas : Pierre qui roule n'amasse pas mousse

---

duoblaj rimoj : pafas,trafas - festeno/ĉagreno -afabla/agrabla-kranio/opinio-arĝento/silento deziras/akiras-piuloj/pekuloj-interkonsento/dokumento-trankvilo/konsilo riveron/teron-kuniĝas/fariĝas-kalkuloj/kunuloj.

---

SLOGANOJ : Pola amiko sendis numeron de la "Lodza informilo",en kiu troviĝas la ĉi-subaj nekompletaj sloganoj. Ne ĉiuj estas favoraj al esperantistoj!

-Pli facile venos ....... vento ol la verda ........
-Ne venos la fina ..... nur per kanto de "La ........"
-Li jam posedas PIV-on,sed ankoraŭ ne ...........
-Sen la verda ..............,griza estos la futuro
-Vivu la stel',vivu la verda stel'
sed por la nokto estu preta ........
-Inter stelo kaj ŝtelo estas pli ol nur ..........

LIMDATO
por la numero 119 :
21 XII

Sendu
viajn kontribuojn
antaŭ tiu dato !

* * *

